# LIGILO

DE

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

N-ro 24 - OKT/NOV/DEC 1994

## KARA LEGANTO

Jen la lasta Ligilo/94. Ja ni bezonas (kaj meritas) pli oftajn numerojn. Sed ĉio venas siatempe. Aliaj servoj same necesas por nia progreso. Ni paŝo post paŝo bone strukturigas nian movadon. Ni havas ampleksan abonservon. Nia libroservo kontentige funkcias. Nia perkoresponda kurso kreskas ĉiutage. La Federacia Konsilantaro, dum sia historia kunveno en januaro/95, certe aprobos (ni esperu kune!) du gravajn projektojn, kiujn BEL-estraro proponas: tiu pri la INFORMSERVO kaj tiu pri REPREZENTANTA RETO. Krome, la esperantistaro certe prezentos aliajn projektojn (ni esperu kune!) por la nepra kaj definitiva forlaso de la malmultefika rondo de amatoreco. Kaj NI ESPERU KUNE! ke 1995 estu portanto de multe da kuna laboro kaj progreso, estu fonto de multe da ĝojo kaj sukceso! Kaj ne forgesu, dum la kristnaskaj festoj, la mesaĝon de Tiu, kiu datrevenas!




Feliĉan Kristnaskon

kaj

Ĝojan Novjaron!

Ĉion bonan por vi

dum 1995!

# LIGILO



Oficiala organo de
BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Caixa Postal 03625 70084-970 Brasília (DF) Telefone [061] 226-1298

Aperas trimonate
Redaktas BEL-Estraro

## ESTRARO DE BEL

| | |
|---|---|
| Prezidanto | Francisco Mattos de Oliveira |
| 1-a Sekretário | José Carlos Dorini Ramos |
| 2-a Sekretário | Wilson Álvares de Oliveira |
| 3-a Sekretario | Lício de Almeida Castro |
| 1-a Kasisto | Aymoré Vaz Pinto |
| 2-a Kasisto | Maria das Dores Góes |

### Kontrolkomisiono

Altino Araújo Vasconcellos
José Romão Filho
Paulo Ricardo Grazziotin Gomes

### Anstataŭantoj

Adolpho de Miranda Silva
Ismael de Miranda e Silva
Maria Isabel Botelho Ramos

## KOMISIITAJ DIREKTOROJ

Adolpho de Miranda Silva
Carlos Maria
Cleto Galvão da Silva

## PREZIDANTO DE LA FEDERACIA KONSILANTARO

Ivaldo Alves de Souza

## KOMITATANO "A"

Symilde Schenk Ledon

## FAKA KUNLABORANTO

Brazila Komitato de Esperanto-Instruado

# TRA BRAZILO

BELO HORIZONTE (MG) - SEMILO estas la bulteno de Societo Esperantista de Minaso (SEM), kies 10-an numeron ni ricevis kaj dankas. Pere de ĝi, SEM informas, ke la grupo intencas festi Esperanton en la 15-a de decembro ĉi-jare. Okaze de la festo, la tieaj esperantistoj vizitos la placon Zamenhof, kiu estas riparita de la koncerna urba servo.

BRASILIA (DF) - Legio de Bona Volo (LBV), tradicia ekumena institucio, inaŭguros en la 25-a de Decembro, je la 15-a horo, la Mondan Parlamenton de la Ekumena Frateco. LBV uzas E-on por disvastigi siajn ideojn kaj farojn. Tial LBV dissendis invitilojn kaj en la portugala kaj en la internacia lingvo. El la invitilo, kiun ni ricevis, ni transkribas la jenon: "Nun, pli ol neniam, estas necese ke ni sciu travivi unuecon en la diverseco, por ke ni povu superpasi la kontrauecon. Tero estas nia Planeda Hejmo, nia kolektiva loĝejo. Tial LBV - unu el la plej grandaj Organizacioj Ne-ŝtataj filiitaj al Unuiĝintaj Nacioj (UNO) - lanĉas en la mondo ĉi tiun Ekumenan Parlamenton, kiu proponas la universalan interkonsiliĝon pri la tuta kono homa kaj spirita, per grandpova forto je la servo de la popoloj."

La 16-an de Decembro Pola Ambasado akceptos por omaĝoj al Zamenhof. Post la akcepto okazos prezentado de filmo pri la fama polo Janusz Korczak. La invitojn Pola Ambasado adresos al BEL/UEA-membroj loĝantaj en Braziljo.

CAMPINAS (SP) - La ĵurnalo "Correio Popular" daŭrigas la disvastigadon de Esperanto pere de noticoj senditaj de Campinas Esperanto-Klubo.

CURITIBA (PR) - Ekde Julio/94 Paraná Esperanto-Asocio estas membro de la Federacia Konsilantaro. Tial, la tuta suda regiono de Brazilo havas reprezentantojn en la grava gvidantaro de Brazila Esperanto-Ligo.

Laŭ Paraná Informilo, de Paraná Esperanto-Asocio, Prof-ro Geraldo Mattos revenis al Curitiba en la komenco de aŭgusto post longa tempo en Krakov (Pollando). BEL-estraro bonvenigas la karan profesoron!

Ŝtata lernejo "Sebastião Paraná", en la kvartalo Boqueirão, subtenas E-an kurson. Tie instruas S-ino Maria Dudin de Souza al lernantoj de la 5-a kaj 6-a klasoj kaj al 8 adoltoj.

FLORIANÓPOLIS (SC) - ANTAUEN! estas la titolo de la ĉiumonata bulteno de Esperantista Asocio de Santa Catarina. El la numero de oktobro ni transkribas la sekvantajn noticojn:

"KULTURA FONDAĴO SIMPOZIO - Eblas ke kelkaj el niaj forkurintaj anoj ankoraŭ ne vizitis KFS-on, konstruata ("Prof-ro Pauli aldone ĝin ekfinas) en Kampeĉo, tuj proksime de kruciĝo al plaĝo. Ampleksa konstruaĵo ĝi estas kaj en ĝi oni flaras E-aromon. Kursojn, prelegojn, festojn, muzikaĵojn oni povas alterne ĝui en KFS. Sabate kaj dimanĉe ĝi kutime akceptas samideanojn kaj simpatiantojn, posttagmeze. Aliran straton oni tuj asfaltos!"

"EASKAJ E-KURSOJ - Estas proponataj al interesatoj: BAZA, PROGRESIGA kaj PERFEKTIGA, per korespondado kaj laŭ programo. Ili daŭras ses monatoj; aŭ pli; aŭ malpli; la tempolimo dependas de la kursanto mem. Tiu, kiu lernas la progresigan kurson, jam scipovas nete ŝanĝi leterojn internacie!"

"PAROLIGA KUNSIDO - Ĉiusemajne, merkrede, okazas kunsido en sidejo de EASK, je la 18 ĝis 19 horoj. Oni tuŝas internacian kaj nacian movadon, prelegas kaj sufiĉe praktikas la lingvon. Nedubeble ĉiam Esperante, sed... kelkfoje oni eĉ iom krokodilas, por ne tute forgesi la nacian lingvon..."

GOIÂNIA (GO) - Por omaĝi la kreinton de Esperanto, Kultura Esperanta Centro kaj Instituto Goiano de Esperanto (Goiana Esperanto-Instituto) okazigos la feston de Esperanto - Zamenfesto - la 17-an de decembro, je la 19:00 horoj, en la urba Arta Muzeo. Paroladoj kaj artaj aranĝoj konsistigas la programon.

MACEIÓ (AL) - La agema Prof-ro Aristóphio Andrade Alves Filho lasis la belan ĉefurbon de Alagoas. Fakte li lasis nian landon ankaŭ! Laŭ letero sendita de li, 2-jarojn li kaj lia edzino restos en Hungario, kie li instruos E-on al 6-jaraj infanoj ĉe Talento-Lernejo. Prof-ro Aristóphio petis de ni anonci pere de LIGILO, ke li deziras interŝanĝi spertojn kun aliaj E-instruistoj kaj starti korespondadon inter la infanoj. Lia adreso estas: Talento-Lernejo, Budaors, Pf.102, H-2041 Hungario.

Prof-ro Edmilson Pontes, grava matematikisto kaj organizanto de la ĉiujara "Olimpiko pri Matematiko" en Maceió, intencas diskonigi E-on ĉe la matematikistoj kaj gelernantoj pri tiu fako. Li organizas "Internacian Olimpikon pri Matematiko en Esperanto" okazonta en la jaro 2.000.

MARINGÁ (PR) - Jen interesa iniciato. S-ro Fernando Neme publikigis en du regionajn ĵurnalojn "O Diário" kaj "O Jornal" ĉi-tiun anoncon: "Ĉu vi scias Esperanton? Venu paroli kun ni". La reago estis pozitiva kaj eĉ direktoroj de la ĵurnaloj interesiĝis pri Esperanto.

MORRETES (PR) - Al tiu historia urbo geesperantistoj de Curitiba venis en la 28-a de Aŭgusto por okazigi la 1-an Renkontiĝon de la marbordo de Paraná. Akceptis ilin S-ro José Daher. Esperantistoj kaj simpatiantoj ĉeestis en la aŭditorio de la loka Rotariana Klubo por partopreni la eventon. Unue S-ro José Daher prelegis pri la

movado de E-o en Morretes. Poste Prof-ro Geraldo Mattos prelegis pri E-o kiel lingvon kaj kunfratiĝan ilon. Li analizis la Internacian Lingvon ne nur kiel lingvon studatan en Universitatoj, sed ankaŭ sub la vidpunkto de utileco por ĉiuj en la moderna vivo, uzata en religiaj medioj, en la monda merkato, kiel pova maniero por eviti la lingvan diskriminacion inter diverslingvanoj kaj kompreneble kiel ilon por la kunfratiĝo inter malsamalingvanoj. Per komuna promeno la grupo finis la renkontiĝon kaj la kuritibanoj revenis al la ĉefurbo tra la fama montaro "Serra da Graciosa".

**NITERÓI (RJ)** - Je la 11-a de setembro datrevenis Niterói Esperanto-Klubo, kies prezidanto estas S-ro Alcebíades Geraldo Lopes. Tiam NITEK iĝis 47-a jaraĝa! Gratulon!

**PORTO ALEGRE (RS)** - Esperanta Departemento de "Sociedade Espírita Allan Kardec" okazigis solenan kunvenon por festi la centjariĝon de "SEAK", kiam prelegis Prof-ro Walter Augusto Francini. Krom esperantistoj de Porto Alegre, ĉeestis samideanoj de São Sebastião do Caí, de Rio Grande kaj de San-Paŭlo. Gaŭĉa Esperanto-Asocio estis reprezentita de D-ro Ivo Sanguinetti. Entute partoprenis cirkaŭ 200 homoj!

César Dorneles Soares - prezidanto, Miguel Boeira Vianna - vicprezidanto, Beatriz A.M.O. Burigo - 1a. sekretario, Julinha Zoraide Feijó - 2a. sekretario, Carlos D.L. Machado - tesoureiro, Nadir O.B. Paranhos - bibliotekisto. Jen la tuta estraro de Esperantista Societo de Porto Alegre, kiu enposteniĝis je la 9-a de aprilo.

**RIO DE JANEIRO (RJ)** - Esperanto Asocio de Rio-de -Ĵanejro kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj amase disvastigis E-on dum la dua kaj tria trimestroj ĉi-jare. La kunordiganto de tiu granda laboro, S-ro José Rabello de Paula, sendis al ni resumon, lau kiu oni scias, ke artikoloj, noticoj kaj aliaj esperantaj informmaterialoj estis senditaj 98 fojoj al gazetoj, 39 al radioj, 29 al TV, 236 al kulturaj centroj, 43 al preĝejoj. Tiuteme ni ricevis de S-ro Rabello libreton kun instrukcioj por helpi esperantistojn, kiuj estas intervjuotaj de amaskomunikiloj. Ni dankas al S-ro Rabelo kaj profitos lian ideon, kiam ekfunkcios BEL-Informservo.

Rezulte de efika laboro de S-ro Jessé Josias de Paiva, la esperantistoj de Rio-de-Ĵanejro partoprenis la inaŭguron de stratnomo omaĝe al Lidja Zamenhof, filino de la kreinto de Esperanto.

**SÃO FRANCISCO DE PAULA (RS)** - En tiu montara urbo, de la 18-a ĝis la 22-a de julio estis aranĝita la 1-a etapo de baza E-kurso, kiu disvolviĝos dum la jaro sub la apogo de kursgvidantoj de Porto Alegre (RS).

**SOROCABA (SP)** - La paro Eluizio kaj Ângela Bueno prenas la torĉon, kiu esperеble kuntrenos reviviglon de la movado en grava aro, nome la katolikista medio. Ekde Julio la duo respondecas pri la aperigo de "Brazila Katoliko", la oficiala bulteno de Brazila Esperantista Katolika Organizo. Pastro Urbaits dum multaj jaroj publikigis la bultenon. Poste, metis la laboron sur siaj ŝultroj Prof-ro Euclides Carneiro. Ambaŭ kompetente plenumis la taskon. BEL-estraro gratulas la du kaj invitas ĉiujn esperantistojn apogi la novajn redaktorojn, Eluizio kaj Ângela, kiuj kuraĝe alfrontas la por ili novan defion.

**TERESINA (PI)** - Nova Esperanto-grupo ekfunkcias en la urbo; temas pri Esperanta Grupo "Yvonne Pereira". Tie komenciĝis Esperanto-kurso je la 21-a de Aŭgusto, laŭ informo de samideano João de Moura Fé.

**TRÊS RIOS (RJ)** - La agema BEL-ano kaj UEA-Regiona Delegito S-ro Luiz Alberto de Oliveira Coelho organizis E-sekcion en la Komuna Biblioteko de CIEP456 (strato Iglésias Lopes, sen numero, Cantagalo). La sekcio konsistas el 27 esperantaj verkoj. Pri tio la ĵurnalo "Tribuna Post" publikigis unuapaĝan noton kaj Radio Três Rios noticis dum matena informprogramo. Rezulte de tio, ĉirkaŭ 5 libroj ĉiutage estas pruntedonitaj !

**UBÁ (MG)** - Esperanto-Klubo "João Ernesto" okazigis Kultursemajnon, de la 31-a de oktobro ĝis la 6-an de novembro. La ĉefaj eroj de la programo estis esperanta ekspozicio ĉe "Banco do Brasil", vizitita de cirkaŭ 300 homoj; inaŭguro de E-a sekcio en la biblioteko de la Scienca kaj Beletra Fakultato, kun ĉeesto de ties rektoro kaj reprezentanto de Rotari-Klubo; omaĝo al la karmemora Ismael Gomes Braga, kiam brilis impona muzikistaro; kulturkunveno en la urbodomo, kiam salutis la urbestro kaj la prezidanto de la urba parlamento; parolado de la regiona delegito S-ro Luiz Alberto de Oliveira Coelho, kiu estis intervjuita dum 5 minutoj de loka TV-raportista. Radio-programon je 40 minutoj prezentis la entuziasma esperantistino Edina de Barros Reis.

**VITÓRIA (ES)** - Tutpaĝa, riĉenhava kaj multkolore ilustrita artikolo pri Esperanto aperis en grava ĵurnalo nomita "A Gazeta", ekzemplero de la 29-a de julio, dank'al iniciato de BEL-ano Carlos Alberto Ferreira. Krom la historio kaj lingvaj aspektoj de E-o, la ĵurnalistino Mariângela Pellerano, kiu subskribis la artikolon, aperigis diversajn informojn pri la Esperanto-Movado, inkluzive pri la Universala Kongreso en Seulo kaj la Brazila Kongreso en Natal. Sekve de tio, BEL respondis leterojn kun informopetoj pri E-o kaj kursoj. Gratulan leteron ni sendis al la ĵurnalo, kiu diskonigis ĝin en la 14-a de septembro, pere de la rubriko "O LEITOR" ( La leganto). La rezulto estas pli efika kiam "Ni laboras kune".

Federacia Universitato de Espírito Santo kun la apogo de Kapiŝaba Esperanto-Klubo organizis E-an kurson por la komunumo. Gvidata de S-ro Gilson Villas Bôas Passos, la kurso komenciĝis en la 20-a de Aŭgusto kaj okazas ĉiusabate.

# BEL-ANGULO

**APOGO DE CAMPINAS ESPERANTO-KLUBO** - Ni tre dankas al CEK la noton publikigita en ĝia flugfolio "INFORMILO" pri la perkoresponda kurso de BEL. Krom la informoj pri la kurso mem, CEK prezentis sin por apogi la starigon de grupoj de lernantoj kaj por helpi ilin pri iu ajn duboj, eĉ pertelefone.

**BRAZILA APOSTOLIKA KATOLIKA EKLEZIO** - Laŭ letero subskribita de la dioceza sekretario, lia moŝto la Episkopo intencas enkadrigi Esperanton en la Seminarion de Joinville (SC). Unuapaŝe kaj la Episkopo kaj la sekretario fariĝis lernantoj de BEL-Perkoresponda kurso. Ni gratulas ilin pro tiu grava decido kaj sincere deziras sukceson!

**FEDERACIA KONSILANTARO KUNVENOS EN BRASILIA** - D-ro Ivaldo Alves de Souza, prezidanto de FK, jam dissendis la unuan leteron pritraktanta la kunveno de la Federacia Konsilantaro, en Brasília, de la 6-a ĝis la 8-a de Januaro, venontjare (Ligilo n-ro 23-a). Ni esperas, ke la konsilantoj klopodu ĉeesti en tiu grava evento, ĉar ili reprezentas la sentemon kaj volon de la koncernaj esperantaj grupoj. Por trafe profiti de tiu kunveno, BEL-estraro pretigas du projektojn, nome INFORMSERVO kaj RETO DE REPREZENTANTOJ, kies kopiojn ĝi dissendos al la konsilantoj, por ke ili, surbaze de la 21-a artikolo de la statuto, ekzamenu kaj opiniu pri la du proponoj.

**GRANDANIMECO** - Profesoro Euclydes Geraldis de Carvalho cedis al BEL la rajton eldoni 1.000 ekzemplerojn de sia perkoresponda kurso. La materialon, kiun BEL uzas ekde Decembro 1991, oni represis Oktobre ĉi-jare. La grandanima ago de la eminenta profesoro, certe inspirita en la BEL-devizo "NI LABORU KUNE!", evidentigas la potencialon, kiun la brazila movado enhavas. Facile estus laudi malavarecon per la tradiciaj dankvortoj. Tamen, ni plezure registras la historian agon kaj aldonas al la vortoj "Ni tre dankas!" la dankojn de la brazila esperantista familio.

**KAMPANJO "BRASIL ESPERANTISTA** - Fine de Septembro BEL komencis novan etapon de la kampanjo. Per ĉiutaga ekspedo de 30 leteroj al la adresoj disponeblaj en siaj registroj, BEL petas de la adresatoj la starigon de e-studgrupoj uzantaj sian kursmaterialon. La reago estras ĝis nun treege pozitiva kaj ni antaŭvidas grandajn rezultojn. En la tuta lando homoj eklernas la Internacian Lingvon. Multaj esperantistoj engaĝiĝas en la kampanjo, ne nur per la simpla starigo de la studgrupoj, sed ankaŭ per la aktiva partopreno en la asistado al la lernantoj. Ĝis nun la rekordo de matrikuloj apartenas al D-rino Any Vieira da Rocha, el Rio Branco (AC), kiu starigis 3 studgrupojn, kun entute 15 gelernantoj! Sekve de la unuaj rezultoj, BEL-estraro decidis pri la daŭrigo de la kampanjo en la esperantista medio.

**KOTIZOJ KAJ ABONOJ** - Laŭ decido dum la 30-a Brazila Kongreso, en Natal (RN), BEL-estraro ŝanĝis la aliĝokotizojn por la venonta jaro. Por la baza kategorio "Individua Membro" (SI) oni pagos R$ 24,00. La UEA-jarkotizo ankaŭ ŝanĝiĝis. Por 1995 ĝi estos 2,1% pli alta, pro la inflacio en Nederlando! Kategorio "Membro Abonanto" (MA) valoras R$ 30,00 se la kurzo restos stabila.

Laŭ peto de "El Popola Ĉinio" tiuj, kiuj reabonos la revuon devos informi siajn EPĈ-kodojn, kiuj troviĝas supre de la adresetikedo de la EPĈ-sendaĵoj. Tiucele ni rezervis specifan spacon en la aliĝiloj, kiujn ni jam dissendis.

**LIBROJ DONACITAJ DE BEL** - La sukceson de la 30-a Brazila Kongreso de Esperanto parte oni ŝuldas al la apogo ricevita ĉe Universitato UNIPEC, de Natal (RN). Pro tio, BEL-estraro decidis donaci al la biblioteko de UNIPEC 10 librojn, preskaŭ ĉiuj didaktikaj.

**MALAVARECO** - S-ro Adolpho de Miranda Silva sendis leteron al ni pri tre kortuŝa ago! Informis li, ke Brazila Esperanto Ligo ricevos 20% -n de unu el liaj asekuroj pri vivo. Akompanis la leteron kopio de la asekuro kaj skriba aprobo far de lia edzino. Krom atesti sinceran amon al Esperanto kaj fidon al brazila movado, tia iniciato evidentigas, ke lia koro estas tre malavara. S-ro Adolpho permesis al ni publikigi la fakton, nur por stimuli aliajn esperantistojn fari similajn donacojn. Ni tre dankas lin!

**MEDALO SANTOS DUMONT AL BEL** - Dank'al indiko de D-ro Wilson Veado, prezidanto de Historia kaj Geografia Instituto de Minas Gerais, Brazila Esperanto-Ligo honore ricevis medalon Santos Dumont- ora grado - je la 23-a de oktobro. La solenaĵo okazis en la urbo Santos Dumont, kie ĉeestis liaj moŝtaj gubernatoro Hélio Garcia, brigadĝeneralo Wilson Antunes Pereira kaj urbestro José Antonio Pedro. Reprezentis Ligon S-ro Orlando José Lopes Júnior, el urbo Juiz de Fora.

**PLI DA MODERNECO** - Post kelkaj tagoj BEL eniros la rondon de la faks-modemuzantoj. S-ro José Carlos Gonçalves Vieira mondonacis kun la specifa celo helpi la akiron de la koncerna aparato, kiu sendube faciligos niajn naciajn kaj internaciajn kontaktojn, inkluzive ebligante al ni eniron en publikajn eletronikajn retojn (BBS, INTERNET k.s). Al nia kara José Carlos la brazila esperantistaro kune dankas!

# FONDAĴO ALMADA

De la pasinta Ligilo ĝis la pretigo de ĉi-tiu, BEL ricevis la jenajn donacojn:

| | | |
|---|---|---|
| Airton Ferreira da Cunha | R$ | 20,00 |
| Allan Kardec Afonso Costa | R$ | 46,00 |
| Anápolis Esperanto-Klubo (*) | R$ | 130,00 |
| Any Vieira da Rocha | R$ | 1,00 |
| Carlos Alberto Andrade(*) | RS | 6,00 |
| Carlos Caixeta Borges | R$ | 36,20 |
| Carlos Fernando da Costa Alves (*) | R$ | 6,00 |
| Claudio Delandre Elias | R$ | 30,00 |
| Cleusa Maria Leone Cezar (*) | R$ | 6,00 |
| Délio Pereira de Souza | R$ | 100,00 |
| Denisar Arneiro (*) | R$ | 10,00 |
| Denise Arneiro Deslandes (*) | R$ | 6,00 |
| Denise Saraiva (*) | R$ | 6,00 |
| Ecy da Silva Ferreira (*) | R$ | 6,00 |
| Evaldo Pauli | R$ | 26,00 |
| Felicissimo Rosa Borges | R$ | 50,00 |
| Felismar Manoel | R$ | 10,00 |
| Gilberto Aquino Silva Velho | R$ | 12,68 |
| Jason Gonçalves de Lima | R$ | 50,00 |
| João de Moura Fé | R$ | 10,00 |
| João Otávio Veiga Rodrigues | R$ | 10,00 |
| Jorge Neves Cezar (*) | R$ | 6,00 |
| José Francisco Furtado | R$ | 8,00 |
| Julinha Zoraide Feijó Pereira | R$ | 4,20 |
| Manoel Borges dos Santos | R$ | 20,00 |
| Maria da Guia Amorim (*) | R$ | 6,00 |
| Marly de Oliveira Moyses (*) | R$ | 6,00 |
| Nélio Vicente Costa | R$ | 6,00 |
| Neuza Caldas Figueiredo | R$ | 6,00 |
| Sérgio Biolchini Justo (*) | R$ | 10,00 |
| Tobias Ferreira (*) | R$ | 6,00 |
| Willy do Nascimento Sales | R$ | 100,00 |
| Wilson Pereira Deslandes (*) | R$ | 6,00 |
| 30-a Brazila Kongreso de Esperanto (aŭkcio) | R$ | 189,65 |
| Entute | R$ | 951,73 |

Korajn dankojn!

(*) Ĉiumonataj donacintoj

# NIA MONDO

**NOVA STELO SUR LA ESPERANTA ĈIELO** - Ukrainia Esperanto-Asocio lanĉis sian trimonatan gazeton UKRAINIA STELO, kies unuan numeron ni ricevis en Aŭgusto. Ĝi estas 32-paĝa, presita sur luksa papero, bele ilustrita per koloraj fotoj kaj desegnaĵoj. Vere estas la dua reaperigo de Ukrainia Stelo, kiu "naskiĝis" en 1913 kaj post interrompo en 1923 fulmvidiĝis de 1991 ĝis 1992. Ĉi-foje la gazeto eldoniĝas pro la iniciato de S-ro Vasyl Stanovyĉ, la ĉefredaktoro, ĵurnalisto kaj eldonisto. El artikolo verkita de li ni transkribas la jenon: " *Kiel difini la problemojn de la internacia lingvo por la postkomunisma lando, kiel aktivigi nian agadon, ke ĝi konformu al la vorto* movado*? Pri tio mi diskutis en konferencoj, babilis en amika rondo. Dum oni serĉadis monon, subtenantojn, min pli kaj pli turmentis duboj: kial ne mi estu unu el tiuj subtenantoj? Mi ja havas ion plian, ol aliaj entuziasmuloj: privatan gazeton, ejon por redakcio, ioman kvanton da papero, kaj kio ne malpli gravas, sperton de eldonlaboro. Kial surbaze de ĉio ĉi ne fondi nian, ukrainian Esperanto-eldonejon? Amikoj forigis miajn dubojn, la propono estis akceptita unuanime, preskaŭ aklame. Estis decidite, ke la eldonejo funkcios sub la aŭspicio de Ukrainia Esperanto-Asocio...*". La eldonkvanto estas 5.000 ekzempleroj kaj laŭ informo de la gazeto mem, provekzemplero de "Ukrainia Stelo" estas senpage ricevebla. Adreso por korespondo: UKRAINIO UA-293720, Drohobyĉ - Lviv regiono, str. P.Orlyka 3 A.

**MONDA TURISMO** - En la jaro 1970 oni fondis en Vieno asocion por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esperanto. Tiam naskis Monda Turismo (MT). Ĝi havas anojn en 66 landoj, inkluzive en Brazilo, kaj reprezentantojn en 50 landoj. En septembro ni ricevis cirkuleron sendita de MT, el kiu ni transkribas parte interesan noticon pri okazintaĵo en Bydgoszcz (Pollando), kie estas la MT-Centra Oficejo: "*Solena komuna kunveno de Akademio Internacia de la Sciencoj de San Marino (AIS)-sesio kaj MT-simpozio okazis en la Instituto pri Historio de la Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz; invititaj estis urbaj aŭtoritatuloj, kaj la regionaj gazetaro kaj televido vaste informis pri ĝi. Rezulte de kunlaboro kun la Pedagogia Altlernejo kaj kun AIS, la Estraro de Monda Turismo decidis transformi la internacian Studumon pri Turismo en Bydgoszcz, kiu ĝis nun havis unujaran instru-programon, en Internacia Studumon pri Turismo kaj Kulturo, kiu ebligos ankaŭ dujaran kaj eĉ trijaran studadon. Post plena trijara stud-ciklo eblos ricevi licencon de specialisto pri la internaciaj turismo kaj kulturo, kaj eventuale ankaŭ titolon de bakalaŭro de AIS*". Monda Turismo serĉas reprezentanton en Brazilo. Al la interesontoj ni sendos pliajn informojn.

# AGENDO



08-09 OKTOBRO 94 Rio Grande (RS)
5-a Gaŭĉa Esperanto-Renkontiĝo

19-20 NOVEMBRO 94 Aracruz (ES)
6-a Renkontiĝo Esperanta de la Valoj

25-27 NOVEMBRO 94 Maceió (AL)
VIII Laborkunsido de la Nordorientaj Esperanto-Asocioj

26-27 NOVEMBRO 94 Lorena (SP)
17-a Renkontiĝo de Ŝtato San-Paŭlo

27 NOVEMBRO 94 Rio de Janeiro (RJ)
VII-a Renkontiĝo de Esperantistoj de Okcidenta Regiono de Rio de Ĵanejro

11 DECEMBRO 94 Florianópolis (SC)
Naskiĝa Festo Zamenhofa

16 DECEMBRO 94 Brasília (DF)
Akcepto omaĝe al Zamenhof ĉe Pola Ambasado

17 DECEMBRO 94 Goiânia (GO)
Zamenfesto - La festo de Esperanto

6-8 JANUARO 95 Brasília (DF)
Kunveno de la Federacia Konsilantaro de BEL

29-30 APRILO 95 São Francisco de Paula (RS)
Montara Renkontiĝo de Esperanto

02-06 JUNIO 95 Parizo (Francio)
2-a Esperanto Eŭrop-Unia Kongreso

22-29 JULIO 95 Tempere (Finlando)
80-a Universala Kongreso de Esperanto

# BRAZILA ESPERANTO - LIGO

Cx. Postal 03625, 70084-970 BRASÍLIA-DF, BRASIL


JOSE CARLOS DORINI RAMOS
SHIN QI 02,CONJUNTO 08,CASA 15
LAGO NORTE
BRASILIA, DF
71510-080

**IMPRESSO**